# La plej granda poŝtorabo aliaspekte

/Miksitaj ekzercoj pretigitaj al la teksto el la libro Ĉu vi aŭdis, ke... verkita de Katalin Smidéliusz/

***En kazo se vi ne posedas la libron, vi povas trovi la koncernan tekston en la ekzerco ”La plej granda poŝtorabo”***
*******************************************************************************************************************

## I. Riĉigo de la vortprovizo

**Vortoj kaj asociaĵoj el la teksto:** banko, poŝto-banko, ĉeko, kredit-karto, konto, ŝpar-kaso, kontanta-mono, valuto, kurzo, mon-unuo, ŝnuro, sako, tranĉilo, armilo, akcio, monbileto, .....................................

**Monon**: gajni, perlabori, enspezi, elspezi, doni, ricevi, perdi, trovi, rabi, ŝteli, serĉi, ĝiri, ŝpari, pagi, ŝanĝi …...................................................................................................................................

**Aliaj verboj:**
forlasi, ligi, grimpi, akompani, pafi, aresti, puni, mon-puni, mort-pafi, kondamni, aresti

**Personoj**: bankisto, poŝtisto, gardisto, korpo-gardisto, ŝtelisto, rabisto, estro, ĉefo, policisto, fervojisto, bandito, ĵurnalisto, atestanto, ..................................

## II. <u>Demandoj rilate al la teksto:</u>

Ĉu okazas raboj, ŝteloj ankaŭ en via lando?
Kio estas la kaŭzo de krim-aferoj?
Ĉu vi ŝtelus, se vi ne havus monon?
Ĉu vi timus esti poŝtisto en poŝtotrajno?
Kial vi ne uzus pafilon dum rabo?

## III. <u>Kion vi farus,</u>

Se vi gajnus du milionojn da dolaroj?
*Respondo:* Se mi gajnus du milionojn da dolaroj, mi …… ..

Se vi perfekte parolus esperanton?
Se vi estus fil(in)o de milionulo?
Se vi perdus vian pasporton en eksterlando?
Se vi havus fortan dentodoloron dum nokto?
Se vi estus la financministro de via lando?

## IV. <u>Imagu kion vi estus povinta (povintus) fari,</u>

| | | | |
|---|---|---|---|
| se vi | estus estinta / | (estintus) | la ĉefpoŝtisto? |
| se vi | estus estinta / | (estintus) | poŝtisto? |
| se vi | estus estinta / | (estintus) | bandito? |
| se vi | ne estus havinta / | (havintus) | ŝnurojn? |
| se vi | estus povinta / | (povintus) | eskapi kun la granda sumo? |
| se vi | estus vidinta / | (vidintus) | la okazintaĵojn? |

## Konsiloj pri la uzo de la supraj ekzercoj

Ĝenerale la prilaboradon de la tekstoj de *Ĉu vi aŭdis, ke...* mi ne finas per tio ke ni solvas la taskojn de la libreto. Estas bone ĉiam ankaŭ personaligi, aktualigi la enhavon de la tekstoj, eĉ se tiuj kelkfoje estas absurdaj kaj nekutimaj.
En la supra paĝo videblas diverstipaj ekzercoj.

***La tasko nr. I***.

Ĝi estas leksika ekzerco por riĉigi la vortprovizon koncerne la enhavon de la "novaĵo".
Tiutipa vortkolektigo estas ĉiam bona ripeto al la lernantoj, kaj krom la jam lernitaj vortoj oni povas trovi novajn aŭ sinonimojn kaj antonimojn de la jam konataj vortoj.
Eblas fari la taskon ankaŭ antaŭ la lego aŭ aŭskultigo de la teksto, kiel prepariĝon por la laboro. Tiukaze la insruisto difinu mallonge la temon kaj tiel provu kolektigi la koncernajn vortojn. Ni ĉiam klopodu ne nur kolekti la vortojn kaj esprimojn, sed ankaŭ en frazoj uzi ilin.
Kompreneble la listo de la ekzerco estas daŭrigenda....

***Tasko nr. II.***

Necesas aktualigi ĉiujn legitajn tekstojn, demandi la opiniojn de la lernantoj pri ĝi kaj provi pluiri al similtema, sed prorasperta evento kiun oni volonte rakontas. Tion helpas la koncerna tasko.

***Tasko nr. III.***

La teksto donis bonan bazon por ekzerci la kondicionalon, do ni ne preteriru tiun eblon.

***Tasko nr. IV.***

La pasinta tempo de la kondicionalo estas de kelkaj tute ne uzata formo, aŭ estas ofte disputo kiu formo estas la ĝusta, ĉu la analiza ĉu la sinteza.
Laŭ mia opnio ambaŭ ĝustas kaj estas demando de stilo kiun oni elektas. Pro tio mi nepre instruas en miaj kursoj ambaŭ formojn de la kondicionalo, ekzercigas ilin kaj estu la respondeco de la lernantoj kiun formon ili mem uzos poste.
/Kvankam mi mem tute klare emus uzi nur unu el la eblaj formoj, dum la instrulaboro kaj lecionoj klopodas doni modelojn pri diversaj formoj kaj ebloj. Tion mi konsilas al ĉiuj miaj kolegoj. /